




Nova faka libro: Lernolibro pri oftalmologio de MZ-Verlag

La pasintjara eldono de la libro "La homa korpo" ĉe la eldonejo MZ-Verlag de Harald Schicke signifis la starton de nova serio da fakaj kaj sciencopopularigaj libroj.

Estas ĵus aperinta la dua membro de tiu serio: *Lernolibro pri oftalmologio*. Ĝi estas jam la 3-a eldono de la fama verko de Seiĉi KATO. La unua aperis en 1961, la dua, reviziita eldono en 1965, ĝuste antaŭ la unua azia UK, kaj la nuna okaze de la korea UK. La nuna eldono ne estas simpla represio, sed nove kompostita kaj redeseignita varianta, kio en la unua parto faras ĝeneralan enkondukon en la sciindaĵojn de vidorganoj, kaj en la 2-a parto tra 14 lecionoj pli profunde, paŝo post paŝo instruas ĝian funkciadon, kaj kelkajn malsanojn. La bazan tekston kompletigas 6.5 paĝa indekso.



Zamenhoh mem estis okulkuracisto. Tamen preskaŭ mankus tiufaka literaturo, se prof. Seiĉi KATO ne estus dediĉinta sin al la verkado de tiu libro, - kaj se ne estus Harald Schicke, kiu ebligas ĝian akiradon, ja la antaŭaj eldonoj troveblas nur en katalogoj kaj en kelkaj bibliotekoj.

La 128-paĝa libro kun 39 ilustraĵoj ISBN 3-89240-088-1, kostas 18.5 DEM (por germanoj aldoniĝas al ĉiuj prezoj 7% aldonvalora imposto) ne nur aspektas alloga, moderne, ne nur kontribuas al la E-kulturo, sed povas servi ankaŭ kiel tre bona propagandilo, prezentante la atingojn de nia movado.

Dezirantoj havi ĝin turnu sin al sia libroservo, aŭ rekte al la eldonejo: MZ-Verlag, Postfach, D-21244 Buchholz, Germanio).

László Szilvási

TEJO-estraro intence ignoras la Komitaton?

Kara László,

post multaj telefonvokoj ene de la estraro (oni ŝajne intertempe malŝategas min...!) mi jene prezentas al Vi la rezulton pri la IJK-kotiztabelo:

Dum la estrarkunsido la estraro jes ja konsciis pri la Vraca-a komitata decido (!!!), sed pro evidentaj malfacilaĵoj en Rusio la estraro decidis, malgraŭ tio ke estis ne ĉiuj konsentantaj, tamen akcepti la prezentitan tabelon kaj realigi la komitatan decidon ekde la sekva jaro. *Precipe Saskia, Danny kaj Elena restis tre firmaj, kiam mi pledis por tamena ankoraŭa ŝanĝo kaj respektado de la Vraca-a decido. Elena estis sufiĉe ŝokita pro mia interveno, kompreneble.*



Mi atentigas, ke simple nuntempe TEJO nepre ne havigu al si la "lukson" de kvereloj tiatipaj kaj ke oni iel sufiĉe frue informu pri tiaj malfacilaĵoj kaj serĉu eventuale tamen alternativajn, ĉu ene de Rusio, ĉu eble eĉ eksterlande. Elena asertis, kaj tion ni ja vole-nevole devas kredi, ke por rusoj la B-kotizoj estas jes ja pageblaj! Nu...

Mi firme subtenas la Vraca-an decidon, sed (almenaŭ nun) devas cedi al la ŝajna plimulto en la estraro (kiu nepre plu deziras IJK-n en Peterburgo pli-malpli je ĉiuj kotizoj!). Do, Elena tamen provos iel tranĉi ankoraŭ iomete la kotizojn de kategorio B, kaj Saskia promesis skribi artikolon pri tiu temo klariganta la nerespekton devigan pro la cirkonstancoj... Nu, krome, memzorgantoj ŝajne jes ja ricevos manĝaĵojn (sen krompagi). Decidu vi nun, kion fari...

Klaus Dahmann

Post pli ol duona jarcento alirebla kaj aĉetebla

Enciklopedia vortaro de Wüster sur mikrofilmo!

Eugen Wüster (1898 - 1977) estis ne nur la fondinto de terminologio kiel scienco, sed ankaŭ unu el la plej gravaj interlingvistoj kaj esperantologoj. Lia "Enciklopedia vortaro Esperanto-Germana", kies unuaj 4 partoj (literoj a-k) aperis jam en 1923, estas en multaj rilatoj ankoraŭ hodiaŭ la plej perfekta enciklopedia vortaro Esperanto-nacilingva. Wüster pere de kunlaboranta stabo trakribis la tutan Esperanto-literaturon, surslipigis la utiligotajn partojn, kiuj poste estis la bazo por lia vortarista laboro.

Estas vere bedaŭrinde, ke tiu giganta entreprenado restis torso. La publikigitaj partoj ampleksas nur la literojn de A ĝis K. La alia parto restis en manuskripta formo. Posedanto de tiu manuskripto estas la Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu nun eldonas tiun ankoraŭ ne publikigitan parton de la manuskripto (pli ol 2000 paĝoj) sur mikrofilmo. Sur la filmoj aperos aldone ankaŭ la prilaborita parto de vortaro de Hans Joachim Plehn (K-L). La vortaron kaj la vortistan laboron de ĝia aŭtoro prezentas enkonduke 75-paĝa studo de la Wüster-specialisto Detlev Blanke.

Ekde aŭgusto 1994 la mikrofilmoj estas aĉeteblaj ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo. Prezo: proksimume 100 DM.

Skribu al:

Internacia Esperanto-Muzeo
Hofburg, Michaelerkuppel,
A-1010 Wien, Aŭstrio



Feliĉan novan jaron
al ĉiuj niaj legantoj!

La venko de Montevideo

Ĝuste antaŭ 40 jaroj okazis historie grava evento por esperantistoj: la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo akceptis la unuan rezolucion pri Esperanto, rekonante ties valorojn. En Zamenhof-festo rememoru ankaŭ pri tiu ĉi sukceso.

Estis la rolo de Ivo Lapenna en akceptigo de la unua Unesco-rezolucio favora al Esperanto en 1954, kiu plej famigis lin tra la movado. La jam konata oratoro kaj movada gvidanto ekestis figuro de mitaj proporcioj. Kaj ne senmerite: ĉar tiu unua oficiala rekono de Esperanto en la postmilita mondo estis sendube la plej malfacila, kaj ankaŭ - ĉar la unua - la plej valora tia paŝo en la movada historio.

Ĉar hodiaŭ malmultaj konas la detalojn de tiu triumfo, ni ĉi tie prezentas resuman rakonton surbaze de la raporto en *Esperanto*, februaro 1955.

La grundon oni komencis prepari jam en 1950, kiam reprezentantoj de UEA transdonis al Unuiĝintaj Nacioj "Petskribon pri Esperanto", subskribitan de 492 internaciaj organizaĵoj kaj preskaŭ 900.000 individuoj. En la sekva Ĝenerala Konferenco de Unesko (Parizo, 1952), zorgaj antaŭpreparoj de Lapenna, Privat, Durrant kaj aliaj sukcesis akceptigi rezolucion (de la svisa delegacio) por diskonigo de la Petskribo kaj decido pri ĝi kadre de la venonta Ĝenerala Konferenco en Urugvajo (Montevideo, 1954).

Dum 1953 Lapenna, sub la ŝildo de CED (Centro pri Esploro kaj Dokumentado), kunordigis internacian informkampanjon celitan al naciaj Unesko-instancoj kaj intelektulaj medioj. Samtempe UEA komencis kolekti monon por sendi reprezentanton al Montevideo, kaj fine de 1953 ekkompilis materialon por samokaza Universala Ekspozicio. Dum 1954 la esperantistoj klopodis konvinki iun nacian delegacion al propono de konkreta rezolucio ĉe la Konferenco, sed sensukcese. Fakte la Unesko-raporto pri la Petskribo, kiu aperis en junio, estis sufiĉe malesperiga: nur dek landoj reagis pozitive, dum dek naŭ esprimis sin kontraŭ ia favora sekvo al ĝi.

Tiel statis la aferoj, kiam Lapenna aperis en Montevideo la 1-an de novembro. La tuton de tiu monato li pasigis en preparlaboroj, kontaktante pli ol 300 delegitojn kaj mastrante la pretigon de la Ekspozicio. (Tiu lasta montriĝis ŝlosila en la varbado de apogantoj, kaj oni devas admiri la klarvidon, kiu antaŭpretigis ĝin.) Finfine la 2-an de decembro li sukcesis konvinki la meksikian delegacion proponi rezolucion pri Esperanto: la saman vesperon ĉirkaŭ 30 aliaj delegacioj promesis subteni ĝin. Du tagojn poste la Programkomisiono, kiu unua devis decidi pri reago al la Petskribo (kaj

de du tagoj prokrastis ĝian pritrakton), alvenis al tiu tagorda punkto.

Estis tiam, post prezento de la meksikia rezolucio, ke okazis la fifama interveno de la dana lingvisto Blinkenberg, kiu uzis sian paroladon por ridindigi Esperanton per aro de lerte kunplektitaj mensogoj. Lapenna ricevis nur 3 minutojn por paroli entute, kio post tia malicaĵo kompreneble montriĝis nesufiĉa: per 23 voĉoj kontraŭ 3 kun 19 sindetenoj la komisiono rifuzis la rezolucion. Lapenna sukcesis atingi nur, ke ĝi tamen akceptis la Raporton faritan de la Sekretario en junio, tiel certigante, ke Esperanto estos remenciita en la ferma Plenkusido post unu semajno.

Tamen la ludo ŝajnis finita, ĉar ekzistis nenia proceduro per kiu reenmeti la rezolucion. Sed Lapenna rifuzis cedi. La saman vesperon li kaj membroj de la Urugvaja Esperanto-Societo kunmetis protestleteron, kiun ili dissendis en la hispana al deko da gazetoj; la morgaŭan matenon ili resendis al la Dana Konsulejo ties kulturfilmon en Esperanto. Kaj, mirakle, la afero kaptis la intereson de la urugvajaj ĵurnaloj. (Interalie Blinkenberg faris la eraron diri - kun implica insulto - ke Esperanto taŭgas nur por la urugvajaj menuoj.) Ene de tri tagoj, la rifuzo en la Programkomisiono fariĝis unu el la plej diskutataj temoj en Montevideo.

Tiun atenton Lapenna brile eluzis. Post ol fari intervjuon ĉe radio kaj ĵurnaloj, li formulis tre ekvilibran

leteron al la konferenca prezidanto, kiu matene de la 9-a estis dissendita al ĉiuj delegacioj. La rehoj estis tiel pozitivaj, ke li samtage petis permeson paroli en la fermkusido kiam la Petskribo remenciĝos. Tion rifuzis la konferencaj gvidantoj; sed persona interparolo kun Lapenna, dum lasta horo antaŭ la komenco de la Pleno, persvadis ilin resubmeti la meksikian rezolucion al ĝenerala voĉdono (sen iu kontraŭata punkto 4) kiam leviĝos la akcepto de la Petskribo.

La inundo de gazetaraj artikoloj kaj radioelsendoj en la antaŭaj tagoj pruviĝis decidiga. Preskaŭ sen diskuto kaj sen kontraŭstaro, la rezolucio akceptiĝis en la Plenkunsido per 30 kontraŭ 5 voĉoj kaj 17 sindetenoj; kaj inundo de aplaŭdoj kaj gratuloj, eĥota poste en Esperanto-gazetoj ĉirkaŭ la mondo, salutis la "heroon de Montevideo", en kies kariero - plena de triumfoj - verŝajne nenio povis superi la ekzaltan de tiu momento.

Eble nun, post 40 jaroj, kiam la kunlaboro kun Unesko jam rutiniĝis kaj intertempe venis pliaj rezolucioj, tiu atingo ne plu ŝajnas tiel granda; sed en tiu tempo kaj kunteksto, ĝi estis tertremo.

el esperanto, februaro/1988

Kálmán Kalocsay

Montevideo 1954

Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva:
El la lastvica seĝ' observa
Grandiĝis kun mirakla kresko

Ĝis alto de l' plafona fresko.
Jes, la nerezisteble verva
Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva.

Kia ŝakmajstra fosforesko
De cerbo ĉiam brile serva!
Indigna, sed trankvilkonserva
Pri l' aĉa Blinkenberg-burlesko,

Lapenna venkis ĉe Unesko.

Esperanto aplikata

La "aktuala stato" de DLT

Multaj konas la nederlandan programar-entreprenon BSO pro ĝia plurjara esplorprojekto pri perkomputila traduko. La projekton Distribuita Lingvotraduko (DLT) atingadas informpetoj, proponoj de kunlaboro kaj leteroj de postenkandidatiĝemuloj. Ni ĝojas pri tiu vasta interesiĝo, sed bedaŭrinde ni ne ĉiam sukcesas respondi ĉiun sinturnon aparte. Tial ni klarigas la staton de DLT per ĉi tiu noto.

DLT estas projekto, realigita en la periodo 1984-1990 kun la celo krei prototipan sistemon de perkomputila traduko. (*Senco de la projekto estis, ke ĉiu fontlingva teksto estis tradukita komence al Esperanto, kaj poste el ĝi al la cellingvo. La red.*) La projekto finiĝis kun sukceso. Estis pretigitaj du prototipoj, en kiuj Esperanto funkcias kiel interna interlingvo. Krome, estis ellaboritaj inventoj, kiuj preparas eventualan pluevoluigo de la sistemo.

Sistemo de perkomputila traduko tamen estas tre kompleksa programaro. Programistemojn de tia amplekso eblas evoluigi nur fazon post fazo. Nur per pluraj cikloj de planado, evoluigo kaj testado ĝi povas atingi tian gradon de tradukkapablo, senerareco kaj rapideco, ke eblas kun bona fido vendi ĝin al klientoj. Kutime oni vendas tiajn sistemojn en la formo de t.n. programpakajo. Vendado de produktoj tamen ne estas la komerco de BSO. BSO vendas ne produktojn, sed servojn. Ĝi ne faras programojn, kiuj estas multekzemplere kopiataj kaj vendataj en vendejoj (do ne faras programpakajojn). La fako de BSO estas liveri programar-sistemojn, kiuj estas individue tajloritaj laŭ la spe-

cifaj bezonoj de unuopaj klientoj. Sekve la estonteco de DLT post la sukcesa prototipo-fazo estos ne tia, kia ĝin imagas la plej multaj observantoj. BSO ne mem evoluigos aŭ surmerkatigos DLT-on. Pro la amplekso de la investo, tia kliento devas esti tre grandkapitala firmao. La publikigitaj raportoj (ankaŭ tiuj de BSO mem) ĝis nun kutime prezentis la ŝancojn de DLT tiel, ke aŭ BSO trovos tian investanton, aŭ ĉio estis vana. Atinginte la decicopunkton, BSO tamen trovis trian vojon, pli sekuran kaj pli pozitivan. Per plurjara tre intensa laborado pri problemoj kaj solvoj en la kampo de perkomputila traduko la ekspertoj ĉe BSO kolektis konsiderindan provizon da tre specifa kaj ege malofta scienca kaj teknologia scio. Tiu scio utilas en multe pli vasta tereno ol nur por perkomputila traduko.



Multaj el la teknikoj, ellaboritaj por DLT, estas uzeblaj sufiĉe ĝenerale en inteligenta perkomputila traktado de tekstoj. BSO tial decidis starigi filion por komerce agadi en la estiĝanta merkato de lingvoteknologio. Kvankam ĝis nun ne estis trovita investema firmao, kiu mendis DLT-on ekzakte laŭ la ĝisnunaj planoj, la starigo de la nova filio BSO/Language Technology ebligas al BSO ne perdi la ekspertojn kun la fakscio, necesa por konstrui tradukistemon. Tiel BSO povas plu oferti kaj evoluigi tiun scion. Inter la servoj ofertataj de la nova filio, estas la evoluigado de sistemo por perkomputila traduko. Tio povas esti DLT, sed povas ankaŭ esti alispecaj sistemoj, specife adaptitaj al la bezonoj de individuaj investipovaj klientoj.

BSO do eble neniam konstruos ion, kio portos la nomon DLT, sed ĝi nepre utiligos la teknologian scion, akiritan per la prototiprojekto DLT.

el Fenomeno, jan. 1992!

Seminario pri la tempa trako en Togolando

Ekzistas speciala metodo de helpo al diversaj malordoj en la spino, tre grava parto de la homa korpo. Tiu metodo uzas influon al la spino, kiu laŭ ĝi estas konsiderata kiel *tempa trako* (TT).



S-anino Margarete Bettmann, kiu aplikas kaj propagandas ĉi-metodon, fondas en diversaj landoj TT-domojn (jam en Germanio, Benino, Litovio, Polio) kaj strebas plivastigi tiun reton. La TT-helpo estas en kelkaj landoj ligita kun Esperanto. Ekz., en Benino en la sama TT-domo troviĝas Benina E-Asocio kaj esperanta biblioteko.

Nun estas planataj TT-seminarioj en Togolando decembre 1994 kaj januare 1995.

Informo ĉe:

*s-ino Margarete Bettmann,
Pitzlergasse 6, D-52353 Düren, Germanio.*

Turismo kaj medioprotektado

Por ekspozicio kaj konferenco pri la temo "Turismo kaj medioprotektado" en Budapeŝto meze de 1995, la organizantoj bezonas konvenan materialon. Bonvenas prospektoj, faldfolioj, afiŝoj k.s., sendotaj al la kunredaktoroj de la revuo "La Migranto" (ĝis fino de marto 1995):

*G. Borremans + K. Lencki,
Niedersachsenweg 9 B,
D-21244 Buccholz, Germanio*

Kontaktoj serĉataj!

"Pagotur" bonvenigas al Ĉinio diversajn karavanojn kaj okupiĝas ankaŭ pri ĉiuj privataj vojaĝdemandoj pri Ĉinio.

Chahg Le Zhong Lu 21 Hao.

CN-710032 Xi'an, Ĉinio.

Tel. kaj fakso: +86-29-3238859.

Eksporto de minajoj (smeraldoj, beriloj, turmalinoj, kvarcoj, jaspoj...) kaj agrikulturaĵoj (vaniloj, kafoj, kariofiloj, licioj...). Importo de elektraj motoroj, agrikulturaj maŝinoj, ladaĵoj, aŭtopecoj k.a.

E-Societo pri Minekspluatado,

Lot IV B, 71 Ambohimiadana

Sud Ambohimaranina,

Antananarivo-101, Madagaskario.

Tel. +261-2-30205, fakso +261-2-31201


Komercajn kontaktojn en Minsk kaj najbaraj urboj serĉas:

Jan Pipen, str. Harlaska 114,

PL-43-400 Cieszyn, Polio.

Ĉefepiskopo celebris en Esperanto

Dum renkontiĝo de katolikaj esperantistoj el Ĉeĥio, Polio kaj Germanio 7-9.10.94 en Prago, la sanktan meson celebris en la internacia lingvo Esperanto la praga ĉefepiskopo Miloslav VLK, kiu patronas agadon de la ĉeĥaj katolikaj esperantistoj. Kuncelbris la pola partoprenanto pastro Karol Mozor el Skočov. Vlk diris i.a. ke "esperantistoj celas ne nur venki la lingvajn barojn, sed ankaŭ interproksimigi la homojn. Tiu strebado tre gravas dum la nuna ega malriĉo de rilatoj".



J. Marik

Rim. de JM: D-ro Vlk antaŭ 40 jaroj faris instruistan ekzamenon pri E-o kaj eĉ estis estro de esperantista junularo en Sud-Bohemio. La 31-an de oktobro li estis en Vatikano promociita je kardinalo.

Per metroo - ĝis Zamenhof

La tutlanda prestiĝa hispana gazeto "La Vanguardia" anoncis per duonpaĝa artikolo, ke unu el la stacioj de la Barcelona subtera fervojo nomiĝos *D-ro Zamenhof*.

el Esperanto ile-de-france, novembro 1994

Jarlibro de TEĴA

La Jarlibreto de TEĴA (Asocio de E-Ĵurnalistoj) enhavas detalajn informojn pri multaj gazetoj. Vi povas ricevi ĝin kontraŭ pago de 10 DEM ĉe la prezidanto de TEĴA Stefan Maul, aŭ kontraŭ 210 BEF (inkluzivanta la sendokoston) ĉe Flandra E-Ligo:



Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Blufoj, fuŝaĵoj kaj faktoj

Inter miaj paperoj mi trovis la suban artikolon de 1987 en formo de manuskripto, verkita de mia edzo, d-ro Ivo Lapenna. Laŭ mia scio neniam ĝi estis publikigita.

Pro tiu fakto, ke Ivo Lapenna estis la konstruinto de la moderna Esperanto-movado kaj gvidis la Movadon dum multaj jaroj, mi opinias, ke esperantistoj devus serioze pripensi liajn atentigojn en la intereso de la Internacia Lingvo, Esperanto.

Birthe Lapenna

Bedaŭrinde, pro la neekzisto de la iama informaparato de UEA, neniu havas superrigardon pri tio, kio okazas en la mondo sur la kampo de informado en la Jubilea Jaro. Ankaŭ la subskribinto ne pretendas havi ĝin. Tial la subaj komentoj baziĝas ekskluzive sur trideko da ricevitaj bultenoj, informaj folioj, komunikoj al la gazetaro, eltondaĵoj de publikigitaj raportetoj k.s.

En tiu tuta materialo mi trovis nur unu trafan informan folion kun objektivaj sciigoj, sen troigoj kaj blufoj. Temas pri "La Tempo - Ekstrablatt", kiun eldonis Germana Esperanto-Asocio (GEA) en la germana kaj profesie redaktis Stefan Maul.

En la cetera trarigardita materialo ja troviĝas pluraj objektivaj informoj, sed ankaŭ abundas blufoj kaj malĝustaĵoj, kiuj senkreditigas la realajn sukcesojn. En pluraj el ili oni skribas pri "milionoj da personoj, kiuj uzas Esperanton". En du aliaj oni povas legi, ke la UK-n en Pekino "partoprenis 24.000 esperantistoj" (evidente, en la fonta informo pro preseraro troviĝis la cifero 24.000 anstataŭ 2.400, sed la transskribintoj devis scii, ke temis pri 2.400). Iuloke oni sciigas, ke en Ĉinio duonmiliono da personoj nun lernas Esperanton; aliloke, iom pli modeste, nur "kelkaj dekmiloj"!

Kial blufadi per tiaj fantaziaj ciferoj, anstataŭ objekte prezenti la faktajn atingojn de Esperanto en Ĉinio, tre rimarkindajn sen la neekzistanta "duonmiliono da gelernantoj"? Kaj kial skribi pri la "populareco de Esperanto en Irano en la tempo antaŭ Ajatollah Komejni", kvankam en tiu lando la Esperanto-Movado neniam estis tre forta, sed prislenti tiujn landojn, inkluzive aziajn, en kiuj la pozicioj de Esperanto estas relative fortaj?

Ie mi legis, ke "la lingvistoj de la tuta mondo celebras la centjariĝon de Esperanto", aliloke, ke "Esperanto estas ĉefe en internacia komerco kaj turismo, kvankam ĉiu povas facile konstati, ke tiuj notoj ne estas ĝustaj, ktp. ktp. Kvazaŭ oni elviviĝadus en dirado de io, kio ne estas, kaj nedirado de tio, kio estas! ...

Alia fuŝaĵo. Antaŭ nelonge okazis en Vaŝingtono kunveneto de deko da esperantistoj por revivigi la tian Esperanto-Societon. La mondkonata *Washington Post* publikigis raporteton, en kiu eĉ la inicianto de Esperanto

ne estas menciita laŭnome, sed priskribita kiel "la filo de juda cenzuristo en carisma Rusio"...

Tiu bagateliga raporteto, laŭ kiu, interalie, Esperanto "sonas kiel itala kun skandinava akcento" (!), finiĝas per jena opinio de ... la prezidanto de la revivigita E-Grupo: "Ekzistas du specoj de personoj: personoj, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto, kaj personoj, kiuj pensas, ke Esperanto estas grupeto da etaj maljunaj sinjorinoj, trinkantaj teon kaj konversaciantaj pri la Unua Mondmilito". Se tiel parolas la prezidanto de Esperanto-Societo en la ĉefurbo de Usono, oni ne povas atendi, ke *Washington Post* skribos ĝin alimaniere.

Fine io, kio rekte rilatas al la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz. En la bulteno *Internationale Informationen* (Internaciaj Informoj), kiun eldonas "Esperanto-Amikoj" en Vieno, troviĝas pli aŭ malpli ĝustaj novaĵoj, rilatantaj al Esperanto. En n-ro 1/87 aperis informo, ke en 1235 universitatoj aŭ "ŝtataj akademioj" de 28 landoj Esperanto estas devige aŭ fakultative instruata!

Konkrete al tiu evidenta blufo, gravaj faktoj pri la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz tute ne estas menciitaj. Pri ĝi aperis nur 4-linia informo kun sciigo pri la monumento kaj indiko de la adreso de la LKK. Eĉ ne unu vorto pri la ĉeftemo, pritraktata en 11 lek-

cioj de alte kompetentaj lekcistoj; nek pri la oficiala partopreno de la Akademio de Esperanto kaj de du internaciaj sciencaj akademioj, uzantaj Esperanton; nek pri la fakto, ke rektoroj de praktike ĉiuj aŭstriaj universitatoj patronas la Konferencon. Sed *Internationale Informationen* prislentas tiujn faktojn kaj preferas blufi per la 125 neekzistantaj universitatoj. Preskaŭ nekredeble! ...

Ivo Lapenna

Rim: Iom mallongigite. La red.

"En 1954 komenciĝis la dudekjara periodo, dum kio Ivo Lapenna ludis la plej elstaran rolon en UEA kaj la Esperanto-movado entute. Akirinte vastan popularecon kiel "heroo de Montevideo" pro sia komence senespera, fine triumfa lukto por rekono al Esperanto fare de Unesko, li iĝis ĝen. sekr. de UEA en 1955 (poste prez. ĝis 1974. - ndr). Ne estas troigo aserti, ke ĉiuj gravaj iniciatoj kaj atingoj de la Esperanto-movado ekde la komenco de la 50-aj jaroj estas pli aŭ malpli rekte la merito de Lapenna: la fondo de CED, la starigo de Internacia Somera Universitato, la aĉeto de domo de UEA en Rotterdam, la sekiigo de TEJO, la subskribo-kampanjo por propono al UN, la ekaperigo de la revuo La Monda Lingvo-Problemo..."

(citaĵo el Esperanto n-ro 986).

En 1994 pasas la datrevenoj de la 1-a Unesko-rezolucio en Montevideo (40-jaroj), la ekziĝo el UEA en Hamburgo en 1974 (20-jaroj) kaj lia morto la 15-an de decembro 1987. - L.S.

Movado

Antaŭ la jaro de Andreo Cseh

Prave konstatas la konata moto: *Zamenhof iniciatis la lingvon, Andreo Cseh la metodon instrui ĝin*. Kaj vere, apenaŭ ekzistas seriozaj E-instruistoj, kiuj ne estis flamigitaj almenaŭ por certa tempo per la genie simpla metodo de la apostolo de Esperanto. Lia pedagogia instruo estas tiom pli multvalora, ke ĉiuj ĝiaj elementoj senescepte venas el la praktiko mem. Nenio estas pli malroksima de A.Cseh ol nura teorumado, gravmiena profesorumado. Ĉe li ĉio servas por unusola celo, nome: paroligi la kursanojn kiel eble frue, kiel eble lude, kiel eble funde lernigi al ili la gramatikon kaj vorttrezoron. Lia metodo donas situ eblon vere ellerni la lingvon en aktivigaj situacioj viglaj kaj bonhumoraj.

Géza Kurucz

Andreo Cseh

Andreo Cseh (12.09.1895 - 09.03.1979) naskiĝis en Marosludas, Hungario (nun Ludoŝul de Mures, Rumanio). Li esperantistiĝis en 1910 estante gimnaziano. En 1919 iĝis katolika pastro. En 1920 li ellaboris sian metodon, kiam devis instrui Esperanton en mizeraj postmilitaj kondiĉoj ĉe manko de lernolibroj. La metodo unue estis aplikita en Sibiu kaj Cluj-Napoca (Transilvanio). En 1922 li fondis Rumanian E-Centron kaj organizis la unuan post la unua mondmilito rumanian E-kongreson.



En 1924 li akiris de sia episkopo libertempon por tute dediĉi sin al E-movado, kaj iĝis sekretario de la Internacia Centra Komitato en Ĝenevo, kunlaboranta en la organizado de la UK-oj en Ĝenevo, Danzigo kaj Budapeŝto. En Budapeŝto li gvidis sian unuan Internacian Pedagogian Kurson; tiuj kursoj poste fariĝis tradicia ero de UK-oj. Li ricevis multajn disĉiplojn, sukcese aplikintaj lian metodon, inter ili estis T. Moraria, J. Baghy, H. Seppik, Lidia Zamenhof, J. Forge...

En 1927 Sveda E-Federacio invitis lin gvidi aron da sukcesaj seminarioj kaj kursoj (i.a. en Sveda Parlamento). Post grandaj kursoj en Estonio, Latvio, Nederlando, Polio, Germanio, Norvegio, Francio, Svisio, li venis definitive al Nederlando, kie kun gesinjoroj Isbrucker en 1930 fondis Internacian Cseh-Insituton. Du jarojn poste li kreis revuon "La Praktiko", kiu ekzistis ĝis 1970. Unu el liaj tre spritaj inventaĵoj estis longe uzita internacia esperantista monunujo "stelo".

Ne malfondo, sed 30 studentoj!

En la lernojaro 1994-95 pli ol 30 studentoj komencis lerni la Internacian Lingvon en la pedagogia altlernejo de Szombathely sub la gvido de profesorino Katalin Smideliusz. Esperanto fariĝis populara inter la studentoj danke al la entuziasma varbado de la 15 progresantaj studentoj, el kiuj multaj ekleris la lingvon nur je unu monato pli frue, en la tendaro de esperantistaj naturamikoj en Szödliget. Ilia celo estas ne nur superi la ŝtatan lingvoekzamenon, sed multaj vere interesiĝas ankaŭ pri la movado.

Kuraĝigaj poŝtkartoj kaj korespondpetoj estas bonvenaj.

BDTE - Esperanto-Grupo,
H-9700 Szombathely, pf. 170.

Fakso: +36-94-312248

Internet: smidik@f32.bdtf.hu

Rim: La aliĝinta 30 studento vere estas bona "rezulto", des pli se ni scias, ke pasintjare oni sukcese nuligis la E-instruadon en la Szombathely-a Altlernejo... Gratulojn al Katalin!

Mil unuaj vortoj - por infanoj

Esperanto-Asocio de Britio eldonis belan, multkoloran libron, celatan al junaj infanoj. Ĝi prezentas la MIL UNUAJN VORTOJN kiujn plej multaj infanoj volas uzi en Esperanto. La libroj estas amuzaj kaj klaraj.



Laŭ aŭtora rekomendo plenkreskulo (Vi) rigardu la bildojn kun la infanoj, kaj babilu pri la aventuroj de la rolantoj.

La libro estas bona donaco je Kristnasko, aŭ je la Esperanta Librofestoj, la 15-an de decembro.

EAB, 140 Holland Park Ave,
London, W11 4UF, Britio

La naciisma dimensio mankas al Esperanto

Invitiita de la liceo Charlemagne en Trionville, la franca lingvisto Claude Hagège prelegis pri "Eŭropo de la lingvoj". Jen la plej gravaj eroj de la prelego.

Eŭropo estas kontinento kun multaj lingvoj. Nur 8 lingvoj estas parolataj de pli ol 30 milionoj da parolantoj sed ĝenerale la uzo de la lingvoj koincidas kun la ŝtataj limoj. Male en Afriko. Kial? Ĉar en Eŭropo la centrismo de diversaj imperioj faris el la lingvo unu el la batalkampoj por pruvi identecon. Tiu multlingveco en Eŭropo estas ĝia kerno kaj faktoro de estonto kaj evoluo.

Kiaj estas la ĉefaj lingvoj? La rusa havis grandan politikan kaj kulturalan rolon kaj povos retrovi sian rolon de interlanda lingvo en Orient-Eŭropo. La germana, kiu donis pruvojn pri sia nuna demokrateco estas bela kultura ligvo, kiu nun instaliĝis pro la forteco de germana marko. La franca fortiĝis pro la kulturo de siaj parolantoj kaj sukceso de siaj merkatoj tra la mondo. La angla revenis kiel angla-usona pro la usona ekonomia forto kaj disvastiĝis nur pro sia natura inerteo.

Ĉu la angla estas danĝera por Eŭropo? Ne, se ni konsentas pri iu procento de toleremo. Tamen estas utile fari diversajn decidojn por kontraŭbatali ĝin kaj eviti, ke ĝi fariĝu la dua lingvo por ĉiu eŭropano. Kiam du homoj interkompreniĝas per la angla, konscie aŭ ne, kaŝas sin malantaŭe ia forto de usona hegemonio. Kiu asertas la malon, vin trompas.

Kia devas esti la eŭropa politiko? Ĉiuj landoj devas instrui la lingvo(j)n de la najbaro(j), ĉar per tiu lingvo la junuloj trovas laboron. En Francio ekz. malpli ol 50 % de la lernintoj de la angla profesie uzos ĝin, dum la kono de la germana aŭ de la luksemburga permesos al ili esti dungitaj.

Kaj Esperanto? Ĝi estas vera lingvo, plenrajta. En la pramenso de la homo, la lingvo sin apogas sur la nacio, eĉ naciismo. Sekve tiu historia dimensio mankas al Esperanto...

Renée Triolle
El Monaco, septembro 1994

PIV, afiŝoj kaj junularo

Kutime, fininte la unuan kurson, oni tuj komencas vojaĝi al internaciaj renkontiĝoj, kaj nur malgranda procento daŭrigas per superaj kursoj aŭ komencas pliperfektigi sian lingvoscion. Estas ankaŭ komuna informo, ke junularo ne tro multe legas. Do, kiel plibonigi la lingvonivelon?

Esperantujo estas la lando de la eternaj komencantoj. Oni povus eviti tion, se almenaŭ, ellerninte la lingvon, oni ekzercadus ĝin ne nur en renkontiĝoj, sed ankaŭ per legado. Bedaŭrinde tio ne okazas...

Se la junuloj ne legas, ni devas venigi la legaĵon al la junuloj, tiel, ke ilia lingvonivelo plibonigu.



Kion signifas tio? Kion pli legas kutime la

gejunuloj? La aliĝilojn, la programojn, la raportojn pri la renkontiĝoj. Do, almenaŭ ili estu en korekta E-o. La organizantoj kaj la redaktoroj devas peni mem skribi korekte, kaj korekti la kontribuojn.

Bona ideo estas provizi la halojn de ĉiuj renkontiĝoj per PIV. Dum la lasta IJF mi povis rimarki, kiom multe tio utilis al la partoprenantoj. Oni ne povas daŭrigi inventi vortojn, kvankam jam ekzistantajn, nur ĉar oni ne konas la tradukon, kaj poste eĉ pravigi tiajn vortojn, ĉar la uzado de ĉiuj tion faris.

Alia propono povus esti, ke dum renkontiĝoj havantaj apartan temon, oni pendigu afiŝojn kun glosareto de la plej uzotaj vortoj, tiel, ke oni ne povu inventi aŭ bastardigi vortojn.

Pier Luigi
el Itinfo, sept. 194

Opinioj

Kiel ni disvastigas Esperanton?

Ni multe kaj diligente propagandas Esperanton, sed la rezultoj estas modestaj. Eĉ tro modestaj. Kial? Ĉar verkante artikolojn kaj intervjuate, ni rakontas pri la historio de E-o, pri la unuaj paŝoj de la Esperanto-movado, pri eminentuloj, kiuj estis adeptoj de la Internacia Lingvo, pri la facileco de la lingvo kaj ties studado.

Tamen ne tio gravas. Aŭ mi diru aliel: tio gravas, sed tio ne instigas la homojn lerni la lingvon. Pli gravas la demando: kion Esperanto donas al la homoj hodiaŭ? Ni akcentu la hodiaŭan situacion, sed ne la hieraŭan historion. Oni raportu pri apliko de Esperanto en komercio, scienco, turismo, reciproka gastigado ktp. Tiuj raportoj estu akompanataj de konkretaj faktoj kaj ilustraĵoj.

Ni devas ĉiufoje pruvi, ke Esperanto estas viva lingvo, funkcianta kaj fruktodona. Krome ni devas same konstante pruvi, ke Esperanto havas estonton...

Bronislav Ĉupin
el Ruslanda Esperantisto, okt. 194



Se vi fieras pri via esperantisteco kaj volas reklami la lingvon per efika maniero, mendu kaj surgluu etiketon sur vian aŭtomobilon. La 80 x 46 cm granda (eblas aliaj dimensioj) verdkolora etiketo kosta 15 USD aŭ 22 DEM. Mendu ĉe:

Marian Zdankowski,
Pana Tadeusza 15/69,
PL-10-461 Olsztyn,
Polio

Profesia nivelo - kie vi estas?

Kiom kostas papero? Vizitante la butikojn, oni konstante miras. Mi eĉ devas diri, ke mi komprenas nenion pri la prezoj, malgraŭ la fakto ke mi denaske edukigis inter paperoj kaj paperprezoj.

Plej mirindaj la prezoj estas kiam la papero utilas por ia manlaboro por plenigi la liberan tempon, kiu ĉe multaj homoj abundas. Se hodiaŭ aperus ia libreto pri nova tekniko pri faldado, plektado, aŭ alia uzo de papero, kaj se krome oni atentigus pri tio en televida programo, la prezo de la necesa papero morgaŭ dekobligus!

Tamen tio estas neniel komparebla al la prezo de papero, sur kiu oni presis tekstojn en Esperanto. Ne gravas, ĉu temas pri gazetoj aŭ pri objektoj, kiuj klopodas imiti librojn. La prezoj senescepte estas altegaj. Jam mi notis unu el la kaŭzoj, nome la eta emo aĉeti ilin ĉe nia (laŭdire) kulturamanta publiko.

Sed ankaŭ alia kaŭzo ekzistas. Tio estas la absoluta manko de kompreno pri komercaj teknikoj ĉe eldonintoj. *Kvankam ni vivas en socio, kie reklamo abundas kaj la vendotekniko estas preskaŭ scienco, niaj verdaj eldonistoj daŭre sukcesas sekrete prisilenti sian laboron. Anoncoj, fanfaronaj prezentadoj, profesiaj instigoj al aĉeto dolorige mankas, recenzoj tre ofte terure malfruas aŭ tute ne aperas.*



Kaj kvankam la publiko jam plurfoje proponis ian specon de librokulabo, aŭ la eblecon de abonado al novaj eldonoj, ĝis nun mankas klopodoj en tiu direkto.

Eble vi opinias, ke mi troigas? Antaŭ kelkaj monatoj mi demandis, kiu libro plej vaste aperis en nia lando. Alvenis neniu ĝusta respondo. Komprenebla afero, ĉar ĝis nun mi vidis nenion anoncon pri la plaĉa libreto... Strange!

Ko NURMI
el Fenomeno, januaro/92

Revuoj, gazetoj

Mi petas aldoni al via adresaro de E-gazetoj:

- Titolo: ARI (Alp-Adria Ret-Infomilo)
- Eldonas: JAAK (Junulara Alp-Adria Konferenco)
- Redaktoro: Mauro Tauzzi, via Rozzol 47, I-34139 Trieste, Italio
- E-poŝto: m.tauzzi@agora.stm.it

Temas pri senpaga retinformilo, ricevebla nur per elektronika poŝto.


Mauro Tauzzi

I L E I

Vervaj temoj '95

Juna amiko jam en sia kvara numero por la nuna jaro anoncis (eĉ verse) siajn temojn por 1995, tiel invitante kontribuantojn; precipe de junaj legantoj kaj de pedagogoj, kapablaj verki trafan instru-celan materialon.

Konforme al la verbo-centra aliro, kiun postulas la unikaj gramatikaj bezonoj de Esperanto, la temoj estas ne statikaj substantivoj, sed vervaj verboj.



- 95/1: Ni komencas kaj finas ion. Io komenciĝas kaj finiĝas.
- 95/2: Kion vi plej ŝatas manĝi kaj trinki?
- 95/3: Kion vi ŝatas lerni? Kiel vi ŝatas lerni? Kia estas ideala instruisto?
- 95/4: Kion ni ŝanĝu, kion ni konservu en niaj familioj, lernejoj, urboj, landoj kaj en la mondo?

ILEI celas kiel eble pli vaste distribui la revuon - tial triono de la dissendataj ekzempleroj estas donacaj. la redakcio ĵus aldonis 15 novajn landojn (ekz. Bolivio, Kosta-Riko, Malto, Belorusio, Kartvelio) por ke 85 ekde nun atingu.



Por kovri tiun donacadon, ILEI devas altiri pli da pagataj abonantoj, precipe kvantaj mendoj por lernejaraj grupoj. Por tiaj mendoj ILEI ofertas rabatojn ĝis 50 %. En la nova jaro pli granda parto de la enhavo estos celata al grupo uzo por riĉigi la kursan programon. Perantoj en 35 landoj aplikas abonkotizojn, fiksitaj laŭ pagipovo. Novuloj rajtas peti specimeno de *Juna Amiko*:

pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.
Stefan MacGill

Korespondi deziras

Virino, 62-jara, vegetarano, interesiĝas pri ĉio, kio liberigas la homon, la tuta vivo, profito de la meditado. Ŝatas sunon, maron, montojn, tutan naturon. Legas Erich Fromm, Krinamurti. Deziras korespondi kun virino aŭ viro similpenŝa kiu loĝas en varma, suna eŭropa lando. Juanita Nadal, 6 Pycroft Close, Southampton SO19 2QE.

Milton Mendes Jr, 36 j, Av. Pres. Vargas 97, BR-78600-000 Barra do Garcas-MT, Brazilo.

Junulara E-grupo, 40 gelnantoj de mezgranda teknika kaj elementa lernejo deziras korespondi per bk. Barbara Kramarczyk, Internat PTR, PL-32-070 Czernichów 1, Polio.

Pri turisma interŝanĝo, vizitoj, ekskursoj korvolonte grupo. S-ano Kazimierz Sieradzki, ul. Lwowska 59/39, PL-33-100 Tarnów, Polio.

Pri turisma grupinterŝanĝo korespondas nome de la krakova grupo s-anino Wanda Wegrzyn, ul. Manifestu Lipcowego 14/2, PL-31109 Kraków, Polio.

Kiel aboni al EVENTOJ?

1. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube, en la koncerna nacia valuto kaj sumo. La baza abonkotizo por 1995 estas 65 guldenoj, (aere: 76 guldenoj).

2. Pri la abono kaj pago per simpla poŝtkarto (aŭ kun abonila slipo) informu ankaŭ la eldonejon (LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario). Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj la adreson!

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirante) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (65 gld, aerpoŝte: 76 gld.)

- Sendu la monon al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Bonvolu NE sendi ĉekon, ĉar ni ne povas enkasigi ĝin!

- Se ne estas alia eblo, sendu la abonkotizon en registrita letero al la redakcia adreso (pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario).

Landaj kotizperantoj

Aŭstralio: Libroservo de EAE, Tom Elliott, Pk. 230, Matraville, 2036 N.S.W.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144). • 407 ATS.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). • 1250 BEF, aere: 1465 BEF.

Brazilio: Brazila Esperanto-Ligo, Cx. Postal 03625, Brasilia (DF) 70084. • 20 \$

Britio: Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Ave, London W11 4UF, ĝirobanka numero: 54 851 0008. • 24 £, aere: 28 £

Bulgario: Ljubomir Trifončovskij, Al. Stambolijki 17, ap. 11, BG-3000 Vraca. • 35 gld.

Ĉeĥio: peranto vakas, • 770 KCS

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirno: 696 47 37) • 228 DKK, aere: 266 DKK.

Finnlando: Oy Mendoservo, Kivistöntie Hyvinkää, SF-05510. • 205 FIM, aere: 240 FIM.

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris). • 205 FRF, aere: 235 FRF.

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80). • 58 DEM.

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. • 1450 Ft, por duonjaro: 800 Ft.

Hispanio: Hispana Esperanto-Federacio, Rodriguez San Pedro 13-3º-7, E-28015 Madrid (Bankkonto: 14.011.966 ĉe Caja Postal, nome de Federacion Española de Esperanto) • 4875 ESP, aere: 5700 ESP.

Islando: Libroservo de IEA, Saemundsson Hallgrímur, Godatuni 10, IS-210 Gardabae.

Italio: Itala E-Federacio, via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204). • 60 m ITL, aere: 70 m ITL.

Japanio: Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tuihara 3-205, Tenpaku-ku, J-468 Nagoya-si. • aere: 4500 JPY.

Koreio: peranto vakas

Kroatio: Kroatia E-Uniĝo, Maria Belošević, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. • 29 gld.

Litovio (kaj Ĉebaltio): Litova E-Asocio, a.d. 167, LT-3000 Kaunas-C.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Brońwieskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa. • 35 gld.

Portugallio: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Rumanio: peranto vakas, • 29 gld

Rusio: (kaj eksa Sovetio krom Ĉebaltio): IMPETO, Jelena Ševčenko, a/ja 428, RUS-119048 Moskvo.

Slovenio: INTER-KULTURO, Zlatko Tišljár, Kočevarjeva 12, SLO-62000 Maribor. • 29 gld.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby. • 285 SEK, aere: 330 SEK.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. • 52 CHF, aere: 61 CHF.

Usono: E-Ligo por Norda Ameriko, POB 1129, El Cerrito, CA-94530. • aere: 45 USD.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A. • 20 \$.

Ĉiuj aliaj landoj: UEA-kodo: ELLS-S, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. • 65 gld, aere: 76 gld.

25 jaroj...

En septembro '94 estis aranĝita en Budapeŝto jubilea ekspozicio (25 jaroj de LF), kio resumis la plej gravajn eventojn de nia kulturo en la lastaj 25 jaroj. Por eventuale uzi aliloke la ilustraĵojn oni devas nepre havi la skriban konsenton de LF-Koop.

1975

* Eksplodas la "bros-problemo": István Szerdahelyi (1924-1987), docento pri interlingvistiko en universitato ELTE sisteme kritikis la oficialan teorion pri fortfarado, ellaboritan de Kalocsay kaj Waringhien, kaj sankciitan de la Akademio de Esperanto. "Bros" estas unu el la esceptaj vortoj sur kiu apogis sin tiu teorio.

Temas ankaŭ pri povo-konflikto, kamuflita per lingvistika diskuto (kiel kutime en Esperantio, kiam oni volas akiri la intereson de la amasoj). La celo estas la gvidado de la lingvoevoluo dum la postaj jaroj: ĉu ankoraŭ la Akademio (tiam prezidata de Waringhien) aŭ la universitataj katedroj, el kiuj la budapeŝta estas la plej grava. Szerdahelyi estis de 1972 ĝis 1980 la lingvistika redaktoro de *Literatura Foiro*.



* Ĉesas Norda Prismo, jam en krizo de tri jaroj. *Literatura Foiro* transprenas ĝian rolon kaj samtempe fermas sian italan periodon: ekde 1976 la redaktejo situos en Finnlando, kien migras la ĉefredaktoro, Giorgio Silber.



* Naskiĝas la kolekto *Plejado*,

danke al la iniciatemo de la itala verkistino Lina Gabrielli. Preskaŭ tridek titoloj, plejparte traduka poezio, aperos dum la sekvaj dekkvin jaroj. La unua estis dediĉita al la sonetoj de Louise Labé, per la traduko de W.Th. Oeste.

(daŭrigota)

EVENTOJ, Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 282-88-85.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti az MPV-HPI.
Készült a SZELKER Bt. nyomdában:
H-1161 Budapest, Baross u. 114.
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas LINGVO-Studio kaj Kultura Esperanto-Asocio.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.
Reprezo de artikoloj estas permesita, kun indiko de la fontoj.
Abonkotizo: 65 nlg (aere 76 nlg) al la UEA-kodo ell-s.

Interese...

Ĉu eblas reakiri virgecon?

Kun surprizo mi legas en dania gazeto, ke ne komplikas reestabli perditan himenon. Natura klientaro sieĝas hospitalojn, privatajn kaj publikajn, konsistanta el enmigraĵoj de Pakistano kaj Nordafriko, kiam ili pro familia aranĝo devas reveturi al la origina lando por nupto. Tradicia islama kodekso ja postulas pruvon pri virg(in!)eco. Ne sufiĉas vagaj deklaroj, ke ekzemple pro gimnastika streĉo paneis la membraneto!

Dana kirurgino komunikis, ke en almenaŭ 30 kazoj ŝi sukcese solvis la problemon. Verdire, al ŝi ne plaĉas la hipokrita moralpostulo, sed ŝi ne volis rifuzi ties praktikan aplikadon, konsiderante la sorton de senhimenaj novelzinoj: humiliga forpelo de la samsanga litotuko, fitrakto familia, eble eĉ senrajtigo socia. Sekve la koncernaj kuracistoj, kapitulacie, rubrikas la dekminutan operacion kiel "humanisman asiston". Tamen ĝi kostas ĉ. 5000 danajn kronojn, ĉar la dana sekura sistemo oficiale ne konsideras fizike aŭ psike grava la faktan ekziston aŭ neekziston de tiu tikla organeto. Principe oni nur preventas kaj kuracas malsanojn, sekve aliaj kazoj ne povas esti senpagaj...



Pure praktike, la kirurgo kunkudras eventualajn restaĵetojn de la origina membrano, aŭ fermetas la vaginon per kelkaj malantaŭaj histoj. Sufiĉas loka anastezo.

Kelkaj, kuracistoj kaj aliaj, protestis, ĉar laŭ ili en pli longa perspektivo oni ne helpas al la kompatindaj viktimoj de vira ŝovinismo tiel ekstrema. Prefere enmigrintaj junulinoj/virinoj plej frue sin emancipu de tiu stulta himen-fiksiĝo, favore al egaleco kaj libereco inter seksoj en sia nova lando.

Poul Thorsen
el La Kancerkliniko, dec/94

Ĉu vi jam havas ĝin?

60 minuta sonkasedo kun la fama verko de la fama verkisto - en Esperanto!



Profesiaj solistoj, muzik- kaj kantensemblo.

Eldonis:
LINGVO-Studio.

Prezo: 19 gld,
inkluzive la sendokoston.

Mendu ĝin ĉe la redakcio de EVENTOJ!

Anoncetoj

Nekomercaj anoncetoj de anonantoj estas senpagaj

La dumonatan religian bultenon "Frateco" eldonas la E-sekcio de "Klubo de Katolika Intelektularo". Redaktora adreso: Stanislaw Plachta, ul. Ojcowska 1, PL-31344 Kraków, Polio.

Kotdivoara Esperanto-Asocio serĉas alilandajn Esperanto-klubojn por interŝanĝi ideojn, ĝemeligi. KEA, Yassi Ambroise, 09 BP 1808 Abidjan 09, Cote d'Ivoire, Afriko.

Rondo de Pola E-Asocio en Andrychów aranĝos en aprilo '95 internacian letervesperon kun ekspozicio. Bv. sendi bk, salutleterojn, turismajn prospektojn, E-aĵojn. Respondo garantiata! E-Rondo en Andrychów, Pk. 30. PL-34-120 Andrychów, Polio.

Ĉiujare mi ferias ĉe Nigra maro apud Soĉi, tre malmultekoste = ĉ. 10 USD tage. Mi dezirus ferii kun samideano, ankaŭ bonvenas nudistoj. "Aleksio", ul. Bizjulevskaja 19-71, RUS-115404 Moskvo, Rusio.

Ĉu vi konas ŝercojn pri esperantistoj? Sendu ankaŭ Vi primovadajn anekdotojn, ŝercojn al la rubriko "Humuro" de Eventoj. Ankaŭ la aliaj volas rideti...

La informo en la rubriko "Por via notlibro" prezentanta la nomojn kaj adresojn de la est-raro de Monda Turismo enhavas eraron pri mia nomo kaj adreso. La ĝusta informo estas: Esperanto Vojaĝ-Servo, Lucille C. Harmon, 2389 Thackeray Drive, Oakland, CA-94611 Usono. Tel.: +1-510-3392001.

German-lingvaj progresintoj povas ricevi senkoston provlecionon de "Esperanto-Kurs für Fortgeschrittene", se ili skribe petos ĝin ĉe Internacia E-Muzeo: Nationalbibliothek, A-1010 Wien, Aŭstrio.

Marco Girolametti, sviso, restadas en Bogota, kie li intencas krei kun aliaj esperantistoj domon por stratinfanoj, por ebligi al ili vivindan vivon. Se vi interesiĝas mone subteni la projekton, skribu al li pere de la kolombia peranto de UEA: Santiago Álvarez, Apdo aéreo 54-800, Santafé de Bogotá, 2.



FELIĈAN NOVAN JARON!
Ĝis revido en 1995!

Eventoj

Preskaŭ ĉiu, kiu gravas en
Esperantio, abonas al EVENTOJ.
Ĉu ankaŭ Vi?

- aperas dusemajne, akurate, ankaŭ somere;
- interesajn, elektitajn artikolojn represas el ĉ. 100 aliaj E-revuoj;
- raportas pri aktualaj aferoj: kie, kio okazas en Esperantio?
- informas pri aranĝoj, renkontiĝoj, pri esperanto-servoj, instruado;
- aboneblas ankaŭ por kalendara duonjaro!
- helpas al la abonantoj per diversaj servoj (esperantaj literoj al komputiloj, adresaro de E-gazetaro, donackuponoj, ktp.)

**EVENTOJ APERAS DUSEMAJNE,
KAJ ĜI ESTAS IO ALIA, OL LA KUTIMAJ MOVADAJ GAZETOJ...**

Jara abono: egalvaloro al 65 guldenoj,
aerpoŝte: 76 guldenoj.

La abonkotizon sendu al vialanda kotizperanto (vidu la dorsflankon),
kaj la suban abonilon al la redakcio: pk. 87, Budapeŝto, H-1675, Hungario!

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapeŝto, pk. 87. Hungario

Jes, mi abonas EVENTOJ-n por la tuta jaro 1995!
 2-a duonjaro de 1995!

Familia nomo, nomo:

Preciza poŝta adreso:

..... poŝta kodo

Dato: Subskribo



Eventoj

H-1675 Budapeŝto, pk. 87, Hungario. Telefono & Telefakso: (+36-1-) 282885

Estimata Samideano,

Ĉu vi volas esti informita pri la movadaj aferoj?
EVENTOJ aperas dusemajne, do estas **la plej ofta**
internacia movada gazeto, legata nun en pli ol 50
landoj. Bonvolu aldone trovi provekzempleron.

Karaktero de Eventoj estas duobla:

- unuflanke aperigas aktualajn informojn pri la movadaj eventoj;
- aliflanke ni represas la plej interesajn artikolojn el ĉ. 100 aliaj gazetoj.

Abonantoj de Eventoj **ricevas senpage** la suplementojn, (ekz. ni ĉiujare aperigas la liston de ekzistantaj E-periodaĵoj), povas utiligi la aperantajn "donackuponojn", povas ricevi al sia komputilo Esperantajn literarojn, kaj povas senpage aperigi siajn nekomercajn anoncetojn.

Ni invitas Vin aboni la gazeton por 1995! La baza abonkotizo (inkluzive la 24-fojan sendokoston) estas 65 guldenoj, aerpoŝte: 76 gld, do prezo de unu numero estas inter la plej malmultekostaj! (Bv. mem kalkuli kaj kompari...) Por aboni la gazeton bv. resendi la aldonitan slipon, kaj pagi la kotizon al iu landa kotizperanto aŭ al nia UEA-konto: ELLS-S.

Volonte ni konsiderus Vin ankaŭ kiel nia kunlaboranto. Atendante vian leteron, kun samideanaj salutoj

Gyilván L.

László Szilvási